# Divenu, pri kio mi parolis!

| | |
|---|---|
| **Celo:** | lerni por koncize paroli pri bildoj (tasko dum lingva ekzameno), ekzercado de bazaj lokaj prepozicioj (*sur, en, apud, antaŭ, malantaŭ, inter, super, sub*) |
| **Celgrupo:** | komencantoj, komenca periodo (post lerno de la unuaj lokaj adjektoj kaj bazaj vortoj en la ĉambro, verbojn: estas, staras, sidas). |
| **Antaŭpreparo:** | 6 – 10 bildo similaj pri la sama temo – prefere pri meblitaj ĉambroj |
| **Tempo:** | 10 – 15 min. |
| **Ludantoj:** | ne gravas |

La bildoj estas sur la tablo aŭ gluitaj sur la tabulo. Ĉiuj partoprenantoj elektas por si unu, tiel, ke la aliaj ne rimarku, kiu estis la elektita, kaj poste komencas paroli pri ĝi, ĝis tiam, kiam almenaŭ unu el la partoprenantoj divenas kiu estis la elektita. Certe, ĉiuj en la komenco klopodas paroli – kaj tiel „torturiĝi" – kiel eble plej malmulte, kaj eĉ senkonscie klopodas trovi la esencon.

Sufiĉe bona (kaj simpla!) ekzercado por la komencantoj, kiuj konas ankoraŭ malmulton, kaj jen jam estas pruvo, ke ili ja kapablas komprenigi sin.

